


30
M. BALUCKI

KUZETO

Scena bagatelaĵo en unu akto



ELDONEJO « ESPERANTISTA VOĈO »
JASLO (Pollando)

FRANCUJO : CENTRA LIBREJO ESPERANTISTA
51, rue de Clichy, Paris (9^e)


M. BALUCKI

KUZETO

Scena bagatelaĵo en unu akto

El la pola lingvo tradukis

S. GRENKAMP



ELDONEJO « ESPERANTISTA VOĈO »

JASLO (Pollando)

FRANCUJO : CENTRA LIBREJO ESPERANTISTA

51, rue de Clichy, Paris (9^e)

De l' sama aŭtoro :

Krioj de l' koro.

Penseroj, I-a kajero.

— **II-a kajero,**

WYŚLOUCH : El la lando de ruinoj.

En preparo :

Ĉu vi tion legis ?

Kion homoj valoras.

La pola folkloro kaj popolkanto.

REYMONT, ST. : Noveloj.

Stanislaw Reymont, biografio.

Tra l' okulvitroj de l' sincero.

KUZETO

ADOLFO. — LUCIO. — ZENO.

Scenejo prezentas ĉambron kun tri pordoj : dekstre, maldekstre kaj funde de la scenejo. Dekstre fenestro, proksime skribotablo, sur kiu kuŝas skribilaro.

SCENO I.

A. (*sidas ĉe la skribotablo kaj skribas*).

Z. (*eniras rapide per la meza pordo*). — Nu, kio okazis? Kial vi ne venis al cirko?

A. — Mi? Al cirko? Hodiaŭ?

Z. — Do, ŝajne vi ne ricevis mian leteron?

A. — Neniun.

Z. — Tio estas nekomprenebla. Mi ĝin ja sendis al vi pere de kuriero inter la sesa kaj la sepa.

A. — Ĝuste en tiu tempo mi eliris kun mia edzino iom promeni.

Z. — Eble do via servistino ĝin ricevis.

A. — Sed ŝi ja ankaŭ ne estis hejme. Ŝi eliris por fari aĉetaĵojn. Sed atendu, kiu scias, eble via kuriero metis ĝin en la leterkeston... (*li iras al la pordo, al kiu estas alnajlita leterkesto*). — Io estas en ĝi. (*Li malfermas la leterkeston*). Blua papero?

Z. — Jes.

A. (*elprenas*).— Ĝi estas, ĝi estas... (*li rigardas la koverton*), jes, via skribaĵo.

Z. — Ha, mi povas respiri.

A. — Sed kial?

Z. — Ĉar mi timis, ke la letero ne enfalu hazarde en la manojn de via edzino.

A. — Kial?

Z. — Legu, vi ekscios.

A. (*deŝiras la koverton kaj legas*). « La rondo de niaj konatoj aranĝas hodiaŭ vespere post la prezentado vespermanĝeton en hotelo Klajn por la Cirkaj artistinoj » (*li ĉirkaŭrigardas timeme*). Je Dio, kiel vi povis skribi similajn veraĵojn? Se mia edzino estus leginta tion... Jezu-Kristo!

Z. — Ĝuste pro tio mi ordonis al la kuriero transdoni ĝin nur al vi kaj tiu ĉi mallertulo — sed daŭrigu la legadon...

A. — Tuj, mi nur konstatos ĉu edzino... (*li rigardas en la maldekstran ĉambron*). Ŝi ne estas. Ŝi certe iris al sia najbarino, kiu loĝas kontraŭ ni. Nu, nun ni povas kuraĝe legi... (*li legas pli laŭte*) « Bela Tonjo... » He, Zeĉjo, se vi scius, kiel tiu ĉi friponino plaĉas al mi! Vi eĉ ne imagas! Kia okulo!... (*li metas la leteron senkonscie sur la tablon*).

Z. — Ambaŭ...

A. — Kiel? (*orientiĝinte*) Nu jes, ambaŭ memkompreneble — kaj kiaj piedetoj, kia busto volupta em, em, kia dolĉaĵo... Rasa knabino... Taŭga por ĉio... Kiel ŝi saltas, mi ŝin ne konu... Hop, hop, hop, la... (*li imitas la saltadon de cirkistinoj*) dudekfoje laŭvice. Kia forto, kia fajro! Aŭ tiu danco kun kastanjetoj sur grizulo... (*li dancas kaj kantas, imitante la movojn en hispana danco*) ram, ramtam, ramtatam... Ha! mondo finiĝas. Kia gracio, kia ĉarmo! Kaj mi klakis, ke miaj

manoj eĉ ŝvelis. Kaj tio turnis ŝian atenton, mi diris al vi, ŝi riverencis per sia klasika kapeto en la direkton kie mi sidis kaj ŝi ĵetis rigardon al mi, sed tiel...

Z. — Ke fariĝis al vi varmege.

A. — De kie vi scias tion?

Z. — Sed vi ja mem tion hieraŭ rakontis al mi.

A. — Ha, vere. — Kaj hodiaŭ mi denove nokte songis pri ŝi.

Z. — He !

A. — Kiel mi amas vin. Mi songis, vi atentas? ke mi estis grizulo nebridita...

Z. — Kaj ŝi sur vi ramtam, tam tam.

A. — Je Dio, vi estas prava, kiel mi amas vin, kaj imagu, mi komencis el songo tiel krei pro ĝojo, ke mia edzino vekigis kaj demandis kio okazis al mi. Memkompreneble, mi ne diris la veron, ĉar kvankam homo ne estas respondebla pri siaj songoj, ĉiam estus al ŝi neagrabla, eksciante, ke en songo...

Z. — Vi estis grizulo...

A. — Vi ja scias, ke mi amas mian edzinon! Mi estas bona edzo, sed ĉu mi estas kulpa pro tio... eĉ sanktuloj havis siajn tentojn, ekzemple tia sankta Antonio, kaj kion do diri pri mi! Tiu ĉi friponineto Tonjo tiel kapturnigis min, mi diras al vi, ke mi ne povas havi trankvilon.

Z. — Ĝuste sciante pri tio, mi proponis hodiaŭan vespermanĝeton. Ni sidigos vin apud ŝi, vi do povos satiĝi laŭvole.

A. — Ŝi estos dekoltita?

Z. — Memkompreneble.

A. (*ĝojigita kisas lin*). — Zeĉjo! (*post momento*). Sed, diru nur. Ĉu konvenas tio al edzigito? Se mia edzino hazarde eksciis?

Z. — Kial ŝi devas ekscii? Krome, kiel praktikulo, mi povas al vi diri, ke virinoj ŝatas tiajn homojn, kiuj emas diboĉi. Vi estas tro honesta kaj morala, mia kara, — vi nek trinkas, nek kartludas, nek havas pasiojn, sidas senĉese hejme — tio povas tedi eĉ la plej bonan edzinon.

A. — Tedi, vi diras?

Z. — Memkompreneble. Donu al ŝi, almenaŭ unufoje okazon, ke ŝi povu sopiri al vi.

A. — Vi estas prava.... mi vere tro sidas hejme kaj tedas.

Z. — Nu, do antaŭen! Formetu tiun ĉi malbelan surtuton, prenu alian kaj ĉapelon kaj ni iru.

A. — Mi estos tuj... (*eliras dekstren kantetante ramtamtam, ram tam tam*).

SCENO II.

Z. (*sola*). — Kaj la leteron li lasis, kia gajulo! Se lia edzino vidus ĝin... (*li prenas la leteron, disŝiras ĝin kaj metas en la poŝon, poste li sidiĝas*). — Kiom da klopodoj oni bezonas por eltiri tian malviglan edzon, por ke oni povu senĝene pasigi kun lia edzino sole kelkajn horojn... (*li ekfumias cigaredon*). Ĝis nun nia amo kun Lucio limiĝis al interŝanĝo de profundaj rigardoj kaj sentemaj manpremoj. Sed estas jam fine tempo, por ke post kelkaj monatoj tiu ĉi amo eliru el la infaneco kaj atingu iom pli. Mi petis miajn kolegojn, ke ili lin fortenu kiel eble plej longe kaj ke ili ne ŝparu al li ĉampanon. Kaj dume mi profitos el tio ĉi... (*post momento*) kaj se ŝi min malakceptos?... Mi ne timas... (*li eltiras leteron en blua koverto el la poŝo*). Mi skribis en la letero, ke se ŝi al mi rifuzos, tiam la venontan tagon oni trovos mian kadavron sub ŝiaj fenestroj. El dek virinoj naŭ kaptiĝas per tia diro. Ŝi ektimos, malfermos la pordon kaj tiam... (*li rimarkas la eniranton*) Pst! la edzo!... (*laŭte*) Kio? Vi ankoraŭ ne estas vestita?

SCENO III

A. — Ne... vi vidas, mi ŝanĝis mian intencon, estas eble pli bone, ke mi atendu mian edzinon; mi diros al ŝi, ke unu el miaj malnovaj kolegoj alveturis, kaj ke li nepre volas vidi min aŭ ke iu el niaj konatoj malsaniĝis danĝere.

Z. — Kaj kiam tio estos? (*li rigardas la horloĝon*). Estas jam la deka — la prezentado en la cirko finiĝos baldaŭ.

A. — Mi ja tute ne iros al la cirko, sed tuj direkte al la hotelo. Foriru unue por ke mia edzino vin tie ĉi ne renkontu, ĉar ŝi povus diveni.

Z. (*nevolonte*) — Sed (*flanke*) vi krevu, netolerebla enuiganto (*li prenas ĉapelon*).

A. (*elpuŝigante lin delikate*). — Iru, iru. Mi tien aperos baldaŭ.

Z. — Mi konsilas al vi, ke vi rapidu, ĉar aliaokaze iu povos forblovi al vi el sub la nazo Tonjon. Verdire, tie estos formala sieĝo ĉirkaŭ ŝi.

A. (*gajiĝanta*). — Estas nenio. Ni ŝin akiros — Sinjora Moŝto — ni batalos je ŝi, kiel grekoj je bela Heleno (*li diras tion akompanante Zenon al la pordo*).

Z. — Nu, ĝis revido (*li eliras*).

A. — Ĝis revido.

SCENO IV

A. (*sola, li revenas al la antaŭscenejo kaj diras ĝojigita*). — Nu, la sonĝo iomete veriĝas. Ke nur la edzino revenu ĝustatempe! (*paŭzo malgranda*). Tamen, se mi rememoras al mi mian edzinon, tiam malagrable estas en mia koro — kaj mi havas skrupulojn. Tio estas, tamen, speco de malfideleco, kvankam Zeno diris, ke virinoj ne ŝatas, kiam oni estas tro honesta kaj morala. — Jes, oni devas iom diboĉi — tio eĉ estas necesa por mi, ĉar tio estos por mi kvazaŭ ia kuracmetodo.

Tiu Tonjo estas mia malforta inklino, ŝi ekregis min, ŝi malhelpas al mi en la laboro, ŝi malkvietigas la hejman trankvilon. Oni, do, devas kontentiĝi kaj ŝi plu ne maltrankviligos min. Kaj kiu scias, eble de proksime ŝi ne estas tiel alloga, eble ŝi perdas multe ĉe pli proksima konatiĝo. Mi disreviĝos kaj revenos kuracigita al mia Lucinjo. Jes, por la propra bono, por la bono de mia edzino, por la bono de nia hejmo, mi devegas iri (*post momento*). Eble, mi devus min razi, por ke mi prezentu min pli bone. Ni elprofitu la tempon. Antaŭ ol mia edzino revenos — unu, du — mi estos preta (*li eliras dekstren*).

SCENO V

LUC. (*ĉirkaŭvolvita en tuko eniras, tenante en mano leteron*). — Kiel sentakta estas tiu Zeno, doni leteron al servistino kun la rimarko, ke ŝi enmanigu ĝin al mi sekrete, por ke la edzo ne sciu... Kion tia malsaĝa knabino povas imagi? (*ŝi demetas la tukon kaj malfermas koverton*). Kio? Kio? Li kuraĝis skribi al mi similmaniere! (*kun pligrandiĝanta kolero*). Sed tio estas malinde, impertinente. Tial, ĉar mi estis por li afabla, ĝentila — li kuraĝiĝis ĝis tia grado. Ha, mi ne pardonos tion al li senpune. Mi iros al Adolfo kaj montros al li la leteron (*ŝi iras vigle dekstren kaj subite haltas*). Kaj se Adolfo deziros dueli! Nenio alia restus al li por fari post tralego de tia letero. Kaj li riskos sian vivon je pafado de tiu malsaĝulo — li povos esti malsana. Ne, ne, neniam mi tion povus permesi (*ŝi ĵetas la leteron sur la skribotablon kaj sidiĝas*). Li ne devas scii pri io, li eĉ ne devas supozi, ke estis iu, kiu kuraĝis tiamaniere skribi al lia edzino. Mi mem faros al mi la justecon kaj punigos la kuraĝulon! Li volas, ke mi akceptu lin? Bone, mi akceptos lin, sed tiamaniere, ke dum la tuta vivo li memoros tiun ĉi akcepton. Mi diros — (*ŝi rimarkas la enirinton*) Adolfo... Mi nepre devegos lin de tie ĉi foriri.

SCENO VI

A. (*razita, sed ankoraŭ en matena surtuto*). — Mia edzino (*embarasita*) ... kiel tion diri al ŝi?

LUC. — Kio do, mia edza moŝto ankoraŭ ne en la lito?

A. — Ne, anĝelete, ĉar vi vidas... jen kiel oni diras (*flanke*) ho, la mensogo ne povas eliri tra mia gorgo.

LUC. — Kion vi murmuris tie sub via nazo? (*ŝi alproksimiĝas al li kaj, ĉirkaŭprenante lin per unu mano ĉirkaŭ la kolo, ŝi diras kun plaĉemo*), eble, mia moŝto, anstataŭ dormi, volus iri ien distriĝi, sin amuzi?

A. — Sed, Lucinjo, kion vi pensas?

LUC. — Nu, nu, nur ne senkulpiĝu. Mi ja bone scias, ke viroj tion ŝatas. Kaj mi nenion havus kontraŭ vi.

A. (*flanke*) — Ŝi nenion havus kontraŭ mi! Ŝajne, ŝi volas, ke mi diboĉu.

LUC. — La hejmo de viro estas la mondo kaj la mondo de virino estas la hejmo. Kaj dume, mia edza moŝto sidas hejme kiel tineo inter tiuj ĉi paperaĉoj; tio ne estas bone.

A. (*flanke*). — Tute same kiel Zeno ŝi parolas.

LUC. — Vi bezonas iom da moviĝemo, eniri en societojn. Por viro tio estas nepre necesa. Atentu, de morgaŭ mi mem elpelados vin el la hejmo. Kaj nun iru dormi, ĉar vi certe estas laca per senĉesa sidado super la libroj. Mi ankaŭ kuŝiĝos, mi estas iom malsana kaj havas fortan kapdoloron. Nu, bonan nokton (*ŝi donas sian frunton al kiso*).

A. (*kisas ŝin*). — Bonan nokton, anĝelete mia (*flanke, rimarkinte la leteron sur la skribotablo*). Al diablo, la letero de Zeno!

LUC. — Kio estas al vi? Kio okazis?

A. — He, nenio, nenio, (*flanke*) ŝi nur ne rimarku.

LUC. (*flanke*) — Kiel li tiel rigardas? (*ŝi rigardas sur skribotablon kaj rimarkas la leteron*) Dio, la letero de Zeno! Se li ĝin tralegos, ĉio finota. Kiel lin forigi? (*laŭte*) Nu, iru, iru, mia kara (*ŝi delikate lin puŝas dekstren*).

A. — Ankaŭ vi iru, anĝeleto. Jam malfrue (*puŝas ŝin delikate maldekstren*).

LUC. (*prenas lin je mano*). — Venu, mi akompanos vin, mi devegas vidi ĉu Anjo donis al vi freŝan akvon.

A. — Ne, ne, anĝeleto, ne laciĝu. Vi estas malforta, suferanta.

LUC. — Sed tute ne.

A. — Permesu, ke mi vin akompanu. Apogu vin sur mia brako (*li donas la brakon*). Jes. Malrapide, malrapidete, bele, belege (*akompanas maldekstren Lucion, kiu ŝtelrigardas maltrankvile sur la skribotablon*) Nu, bonan nokton, anĝeleto — adiaŭ, adiaŭ — (*li kisas ŝin, fermas la pordon post ŝi, poste iras rapide al la skribotablo kaj prenas la leteron*). Oni devas antaŭ ĉio bruligi la *corpus delicti* kaj poste, en la mondon — ĉar hejmo de viro estas la mondo — kiel diras Lucio (*eliras dekstren*).

SCENO VII

LUCIO, poste ADOLFO

LUC. (*eniras rapide el maldekstra flanko kaj iras rekte al la skribotablo*). — Ne estas. Li prenis ĝin. Je Dio! Mi estas perdita (*ŝi falas sur la brakoseĝon — post momento ŝi subaŭskultas*). Oni aŭdas bruon en lia ĉambro; kion li intencas fari? (*ŝi kuras al la pordo dekstren kaj rigardas tra la serura truo*). Li vestas sin rapide; li iras dueli. Ne, neniam, neniam mi tion permesos. Mi ne lasos lin. Mi ĵetos min al liaj piedoj, mi konfesos la tutan veron. Mi petos, mi petegos, ĝis kiam li restos. Li iras jam, Dio! donu al mi la forton (*ŝi malantaŭeniras en la fundon de la pordo*).

A. (*eniras en ĉapelo, surtuto, metante la gantojn*). — Kuraĝe ! Oni devas esti viro ; kion oni unufoje diris, oni devas havi la kuraĝon plenumi. Antaŭen ! (*li iras al la meza pordo*).

LUC. (*baras al li la vojon*). — Neniam, neniam. Eble nur post mia kadavro !

A. (*flanke*). — Uu ! mia edzino !

LUC. (*petege*). — Adolfo ! Je ĉio, kio estas al vi sankta, je nia amo, je nia feliĉo mi aljurigas vin : ne iru tien !

A. (*konfuzita*). — Kien ? Mi ja al vi ankoraŭ ne diris, kien mi iras.

LUC. — Vi ne bezonas diri. Mi scias ĉion. La letero de Zeno.

A. (*flanke*). — Al diablo ; ŝi legis ĝin. Kion nun diri al ŝi ? (*laŭte*). Sed vi scias, en ĉio estas kulpa Zeno.

LUC. (*vive*). — Ho, jes. Li estas kulpa. Li, hontinde perfidis nian fidon. Kaj li volis subfosi, ruinigi nian feliĉon. Mi estis por li bona, ĝentila, kora, kiel al via kuzo kaj li — tiu ĉi malindulo kuraĝis — ha, tio estas malhonore !

A. — Li asertis, ke vi virinoj havas ĉiam pli grandan malforton al la viroj, kiuj — kiel tion diri al vi — nu, kiuj diboĉas.

LUC. — Ha, malnoblulo. Li kalkulis ŝajne je tio. Kaj vi al li kredis ?

A. — Nur momente, iom. (*Vive*). Sed nun mi ne kredas, mi ne kredas. Mi amas vin.

LUC. — Kaj vi ne iros al li ?

A. — Mi ? nun ? (*li neas per brakoj. Poste prenas ŝian manon*). Lucinjo plej kara, ĉu mi povus, ĉu mia konscienco permesus nun foriri vidante tiel nerefuteblajn pruvojn de via amo — de indulgo.

LUC. — Ho, kiel vi estas bona, kiel vi estas honesta (*ŝi kisas lian manon*).

A. — Fi, Lucinjo. Kion vi faras, ĝuste mi devus tion fari
(*li kisas ŝian unuan manon, poste la duan kaj la frunton*).

Oni aŭdas frapon al la pordo.

A. (*timigita*) — Li!

LUC. (*prenas la edzon je la mano kaj volas iri maldekstren*).
— Ni iru. Mi ne plu volas lin vidi antaŭ miaj okuloj.

A. — Ne. Pli bone, iru mem, kaj mi forigos lin.

LUC. — Do bone, iru kaj diru al li, ke li estas malhonora,
malnobla, ke mi malestimas lin.

A. — Bone, bone.

LUC. — Ke li tute eraris, opiniante, ke li povos ĵeti grajnon
de malkonsento inter nia geedziĝa kunvivo kaj malklarigi nian
feliĉon.

A. — Bone, Bone, nur foriru, ĉar ne decas, ke li renkontu
vin ĉi tie.

LUC. (*petege*). — Sed ne ekkoleru.

A. — Ne timu.

LUC. — Superregu vin. Li valoras nenion, krom malestimo.

A. — Memkompreneble. Nur iru, iru jam, iru.

LUC. — Forigu lin rapide — forpelu — kaj poste venu al
mi, tien.

A. (*kortuŝita, kisas ŝian manon*). — Vi permesas, anĝelete?

LUC. — Mi petas, mi atendas (*ŝi ĵetas al li rigardon plenan
de amo, sendas per mano kison kaj elkuras rapide maldekstren*).

A. — (*staras ĉe la pordo, per kiu ŝi eliris kaj diras post-
rigardante ŝin*). — Kiel ŝi estas bela, kiel bona, kaj mi volis
malfideliĝi al tia anĝelete. Ho, ne; neniam en la vivo (*oni
aŭdas denovan frapon. Adolfo irante al la meza pordo diras:*)
frapu, frapu. Tio nenion helpas, friponeto. Vi ne tentos min
plu (*malfermas la pordon*).

SCENO VIII

Z. (*eniras rapide*). — Plej kara kuz.... (*haltas rimarkinte Adolfon*) Adolfo?

A. (*signofarante*). — Mallaŭte! Ŝi estas tie; aŭskultas.

Z. (*ankoraŭ konfuzita*). — Nu, ĉar, kiel oni diras, ni atendas.

A. (*signofarante*). — Mallaŭte, frenezulo, ne kompromitu min!

Z. (*pli mallaŭte*). — Nu, ĉar vi estis venonta.

A. — Oho! Mi tute ne intencas.

Z. — Kial subite ne?

A. (*energie*). — Ĉar mia edzino ne ŝatas diboĉulojn, kaj ŝi estas kolera kontraŭ vi. Tiel terure.

Z. — Kontraŭ mi? Kaj pro kio?

A. — Pro la letero, kiun vi skribis. Jen, ŝi petis, ke mi diru al vi, ke vi estas malnobla, malestiminda....

Z. (*serioze*). — Adolfo! Pardonu, se vi postulas kontentigon, mi estas al via dispono; sed min kalumniadi, ofendadi, mi ne permesos.

A. (*bonanime*). — Sed mi tiel ne diras; nur mia edzino — kaj ŝi ankoraŭ diris — tuj, atendu, kion ŝi diris, ke ŝi malestimas vin, ke vi ne montru vin antaŭ ŝiaj okuloj — tiel via letero ŝin ekkolerigis. Kaj kontraŭe al mi ŝi estas — mi diras al vi — tiel bona, tiel dolĉa, tiel indulgema (*prenas lin je la mano kaj premante li parolas ĝojigita per konfidencia tono*); ŝi diris al mi, ke mi restu apud ŝi, ke ni kune pasigos tiun ĉi vesperon.

LUC. (*malantaŭ la scenejo*). — Adolfo!

A. — Ah, vi aŭdas! Per kiel dolĉa voĉo ŝi vokas min al ŝi?

Z. (*flanke*). — Sireno! Kaj kredu al virinoj (*li promenas indignigita tra la ĉambro*); ami tiun ĉi idioton! (*li montras Adolfon*) Ne, tio estas nekomprenebla.

A. (*tusas. Post momento, vidante, ke li ne foriras, diras:*) — Pardonu al mi, mia kara, ke mi ne retenas vin; sed vi vidas, tie mia edzineto min atendas.

Z. — Vi elpelas min?

A. — Sed, kiu tion diras?

Z. — Bone, mi iras; sed, tion memoru, ke mia piedo neniam plu trapasos la sojlon de via hejmo (*eliras brufermante la pordon*).

A. (*ŝlosas la pordon post li*). — Malfeliĉulo, mi bedaŭras lin. Sed ĉiam pli bone, ke ĉio falis sur lin, ol sur min.

LUC. (*duonmalfermante la pordon*). — Edzeto!

A. — Mi iras, mi iras, anĝeleta.

LA KURTENO FALAS
